


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

LA MISTERA UNIVERSO.

Vivante en la spaco sur malgranda ero de materio, la homo de post jarcentoj mire rigardadas la miriadojn da mondoj, kiuj, supre kaj malsupre, ĉirkaŭas lin kaj vane li en ĉiuj tempoj klopodis ekoni la misterajn enigmojn de tiu ĉi miriga scenejo.

Fakte ĉie ĉirkaŭe milionoj da astroj drivas en la profundo de la ĉielo. Se ni povus atingi tiujn stelojn, aliaj senlimaj spacoj en la stelaj abismoj malfermiĝus al niaj rigardoj. Kaj poste eble denove aliaj milionoj da mondoj prezentus sin, ĉiuj obeemaj al leĝoj precizaj kaj harmoniaj.

Koni la devenon kaj la ĝeneralan planon de la Universo, precize scii nian lokon en ĝia mezo, koncepti la nemezureblajn abismojn, kiuj disigas nin de aliaj astroj en la spaco, kies limojn ni ne povas mezuri, jen nur kelkaj el la plej mallumaj misteroj, kiujn la homa menso en la pasintaj jarcentoj ne sukcesis klarigi.

En la pasinteco la homo unue sukcesis difini, ke la tero estas ronda, poste ke ĝi turniĝas ĉirkaŭ sia akso en 24 horoj kaj fine ke ĝi bezonas unu jaron por sia rondirado ĉirkaŭ la suno. Poste, en la jaro 1610-a, venis la malkovro de la lorno, per la eltrovo de Galilei, kiu malfermis al la homaj esploroj novajn horizontojn.

Dume estis konata la Sunsistemo: oni sciis, ke ĉirkaŭ la suno rondiras korpoj nomataj planedoj. Nia tero estas unu el tiuj plan-

edoj. Post la perfektigo de la optikaj instrumentoj, niaj scipovoj ankoraŭ plilarĝiĝis.

Oni sciis, ke preter la limoj de la Sunsistemo venas malpleno de trilionoj da kilometroj, en kiu oni ne trovas astrojn. La Suno kun sia planeda kunularo kaj satelitoj regas suverene meze de senlima dezerto.

Sed post tiu malpleno troviĝas la steloj, kiuj kiel oraj punktoj ŝajnas senmovaj sur la ĉiela volbo. Reale ili estas inkandeskaj globoj, kiuj je fantasta rapideco trakuras la spacon, ĝuste kiel nia suno, kiu kun sia planeda kunularo sin movas en iu direkto kun rapideco po 20 kilometroj sekunde.

Kiun lokon ni okupas meze de miliardoj da sunoj atingeblaj per niaj instrumentoj? Kaj tiuj mondoj, kiuj ĉirkaŭas nin, ĉu ili estas neregule dissemitaj en la spaco aŭ ĉu leĝo difinas iliajn lokojn?

Por havi etan ideon pri la distancoj de la ĉielaj korpoj, ni supozu komenci vojaĝon kun la rapideco de la lumo, tio estas po 300000 kilometroj sekunde. Do, foririnte de la Tero, ni post unu sekundo jam alvenus sur la Luno; kaj post preskaŭ 9 minutoj ni estus sur la Suno. Por alveni al la orbito de Neptuno, t.e. preskaŭ al la ekstremaj limoj de la Sunsistemo, necesus al ni 5 horoj.

Poste ni devus trapasi la grandan malplenan, kiu apartigas la Sunsistemon de la steloj. Kvankam kurante kun la kapturiga rapideco de la Lumo, kiu, kiel ni diris, superas unu miliardon da kilometroj en horo, ni devus vojaĝi seninterrompe dum kvar jaroj tra tiu dezerto antaŭ ol alveni ĝis la „Proxima Centauro”, kiu estas la stelo al ni plej proksima. Nehaltante ni post preskaŭ 5 aliaj jaroj alvenus al la fulguranta „Sirio”. Daŭrigante, ni post 29 jaroj venus al „Vega”, post 43 jaroj ni superflugus „Capella'n” kaj fine post 47 jaroj ni alboridiĝus sur la polusan stelon. Post 100, 200, 500, 1000 lumoj-jaroj kaj pli, ĉio estus fulgurado de milionoj da mondoj inkandeskaj.

Sed tiuj ĉi distancoj estas ankoraŭ nenio kompare kun tiuj, kiuj disigas nin de la grandaj spiralaj nebulozoj. Kio estas tiuj nebulozoj? Ili estas gigantaj amasoj da steloj, kiuj pro siaj grandaj distancoj aperas al ni kiel makuloj blankiĝantaj. La usonaj astronomoj (kiuj posedas la plej potencajn teleskopojn) taksis la distancon de la nebulozo „Andromedo” (eble unu el la plej proksimaj) je unu miliono da lumoj-jaroj. Tio signifas, ke la lumo, kiu nun alvenas sur la Teron el tiu Nebulozo, foriris el ĝi antaŭ miliono da jaroj (ĉiam kurante po 300000 kilometroj sekunde). Sed kiel ni diris, la Nebulozo de Andromedo ne estas la plej malproksima, ĉar per la

potencaj amerikaj teleskopoj oni ekvidas aliajn senfinajn korpojn ankoraŭ pli malproksime.

Kaj jen ekaperas ĉi-riilate la malnova kaj diskutita demando, ĉu la Universo estas senfina. — Sed la nuntempa filozofio nee respondas al tiu ĉi demando, kvankam multaj scienculoj asertas ke la Universo ne havas finon.

Fakte laŭ fundamenta aksiomo de tiu ĉi skolo, la materio estus eterna kaj pro tio ĝi ne havus komencon nek finon.

Per tiu metodo oni glitus de la senfino de la spaco al la senfino de tempo kaj oni finos tiel validigi la fundamentan teorion de la materialismo.

Sed laŭ kiuj rezultoj tiuj ĉi scienculoj riskas proklami la eternecon de la materio kaj konsekvence ankaŭ la senfinecon de la Universo? Tiuj ĉi asertoj estas ĥimeraj kaj nenio rajtigas nin jesi, ke la Universo estas senfina en la spaco kaj tempo.

Por ni senfino signifas simple senlimo. Do ni estas en la abstrakto, ĉar ĉiu reala grandeco estas mezurebla. Ĝi tial povas esti esprimata per ciferoj kaj ciferoj ĉiam supozas unuojn konkretajn kaj apartajn.

Do kiel estas eble unuflanke konsideri nombron de realaj kaj konkretaj unuoj kaj aliflanke doni al tiu sama nombro la koncepton de limneniigo?

Ni skizis tiel rapidegan kaj nekompletan rigardon je niaj scioj, sed ni devas konfesi, ke la homo, malgraŭ siaj senĉesaj klopodoj devas konfesi sian absolutan nescion pri la gigantega kaj mistera strukturo de la Universo.

Ettore Dominici.

(Trad. el la itala revuo „La Scienza del Popolo” de Giacomo Rose, Trieste, Italujo).

LA „MULED”: GRANDA ARABA FESTO.

Ĉi-jare okazis en Tunizio du grandaj festoj preskaŭ samtempe: Kristnasko kaj la Araba festo de la „Muled”. La araboj festis ĝin la 2-an de januaro aŭ, laŭ la islama kalendaro, la 12-an Rabia-el-uel 1369. La vorto „muled” signifas arablingve: naskiĝo kaj nomas la datrevenon de la naskiĝo de „Mahomet, la profeto de Dio” (Mahomet resul Allah).

Jen kiel la araboj festas la „muled”-on en Tunizo:

Dum la nokto antaŭ la festo la virinoj preparas festenon: la precipa manĝaĵo estas la tradicia „Kuskuss” (griaĵo kun legomoj kaj spicita saŭco). Ĉiu familio rezervas porcion „por la mortuloj” kaj donas ĝin al iu almozulo.

Post la manĝado la viroj kunvenas „por trinki teon” (beŝ iŝrabu teĵ). Ili ludas kartojn (la nacia kartludo estas la ŝkuba”) aŭ rakontas terurajn legendojn, en kiuj la „ĝin” kaj la „ŝitan” (malbonaj feoj) ludas gravan rolon.

Kaj nun la suno leviĝas. La mallarĝaj stratoj de la araba kvar-talo, la Medinah, estas riĉe ornamitaj per flagoj kaj girlandoj.

Frumatene alvenas Tunizon Lia Beja Moŝto Sidi Mohammed Lamin Paŝa Bej, reĝo de Tunizio. Li estas akompanata de sia propra gvardio kaj tuniziaj kaj francaj altranguloj. La araboj longe aklamas sian suverenon. Fine la Bejo iras en la Grandan Moskeon de Tunizo por reciti la Preĝon de la Festo (Selet el-aid). Sam-momente estas pafata saluta kanonsalvo.

En la arabaj domoj okazas ĝojega festo. La patroj aĉetas ludi-lojn por siaj infanoj. (Mi kredas, ke tiu kutimo estas de eŭropa origino). La familioj esprimas reciprokajn dezirojn: „Aid Mabruk”! (Bonan feston!)

La virinoj ĵetas en la fajron ian parfumon, la „buhur”, kaj kan-tas: „Mohammed uled, ŝalah mabruk alina” (Mohamet naskiĝis, ke Dio bonvolu beni nin).

Je la tagmeza manĝo speciala manĝaĵo estas preparita: la „aŝi-da”. La araboj preparas „aŝida’n” nur kiam naskiĝo okazas. Do, memore al la profeta naskiĝo ili manĝas la „aŝida-n.” La „aŝida” estas farita el grio aŭ faruno kun butero kaj mielo.

Tiel oni festas Muledon en Tunizo. Kompreneble, la festmanieroj varias laŭ la regionoj. La vera aspekto de tiu festo estas sendube videbla nur en Egiptio kaj en Arabio.


André Secco, Tunizo.

I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Provizora Komuniko pri ILEI-Kunveno.

En la kadro de la U.E.A.-Kongreso en Parizo okazos **nia** jarkunveno. La franca grupo G.E.E. (Groupe des Espérantistes de l'Enseignement) prenis sur sin la taskon aranĝi niajn fakokunvenojn. Okazos komi-tatkunveno de I.L.E.I. kaj **du** publikaj kun-venoj.



Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj.

La jarkunveno okazis la 31-an de decembro en Londono. La prezidanto, 1950, s-ro George Moir (Whitburn) substrekis la fakton, ke la nuntempaj sukcesoj estas la rezulto de penoj de individuoj. La instruistaro estas korpuso de armeo konstrua, ne detrua. Ĉiu individuo estas armilo en la batalo kontraŭ nescio, ignorado kaj skeptikismo. Oni laŭdu la laboron de la individuoj: en la instruado, ĉe la instancoj, en „La Juna Vivo”, sed oni ankaŭ konstatu la potencon de kunlaborado.

La ĉefaj temoj pritraktitaj estis la sintenado de diversaj instancoj, la progreso de „La Juna Vivo” (545 lernejoj abonantoj), la financa situacio rilate la Internacian Ligon de Instruistoj. Oni konstatis, ke ne estos oficiala raporto pri la impresoj de la registaroj, kiuj vizitis la kongreson en Bournemouth. En 22 lernejoj en 1949 Esperanto estis instrutemo, al proksimume 1542 gelernantoj, plejparte dum lerneja programo.

Gravan decidon oni faris, ke S.B.E.T. starigu el sia kaso internacian fakokason po 3 penoj por membro, por ke ni plenumu niajn devojn kiel membra asocio de I.L.E.I. ĝis la financa bazo de tiu asocio estas fiksita.

Jena rezolucio estas akceptita: „Konsiderante, ke Universala Esperanto-Asocio entreprenis kunlaboradon kun UNESCO en la antaŭenigo de komunaj celoj, la Societo de Britaj Instruistoj bonvenigas la starigon de bona interrilatado inter UNESCO kaj UEA kaj konsentas iniciati kaj subteni la aferojn, kiujn ambaŭ celas, precipe la pluan instigon al internacia korespondado kaj vizitado inter la studentoj de Esperanto en la lernejoj de Britujo kaj aliaj landoj.”

Dum aliaj kunvenoj oni pritraktis eblajn metodojn elmontri kapablecon pri Esperanto ĉe lernejoj; oni aŭskultis detalan raporton de Gordon Watson pri la TJO-kunveno en Versailles kaj atentis la konsilojn.

Fine oni ĝuis la treege interesan paroladon de Mason Stuttard, kiu malfermis vigran diskutadon pri „Plena Vortaro, kiel la „Biblio de la Esperantistoj”. Ne li mem elektis la temon!

V. C. N.

Informo: En Angers (Francujo) okazos Internacia Renkonto de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, same kiel en 1947. Petu informojn al f-ino Nouais, 28 Boulevard Descazeaux, Angers, Francujo.

Sendu materialon (poŝtmarkojn, karakterizajn bildkartojn k.t.p.) por la ekspozicio.

Karaj lernejoj,

Ree mi devas danki pro ricevitaj verkaĵoj!

Ann Wilson kaj Dorothy Kilgow (de Tinkers Farm lernejo en Birmingham, Brit.): Ĉu Suzette kaj Esmeraldo estas korespondantinoj de vi? Aŭ ĉu vi nur fantazias? Vi verkis tre bone kaj simple! En ĉi tiu n-ro ni prezentas „Esmeraldo”n.

Interesajn verkaĵojn pri kutimoj okaze de Sankta Nikolao kaj Kristnasko ni ankoraŭ ricevis de lernantoj de s-ro Bobek en Turnov (Ĉeĥosl.). Bedaŭrinde ili ne aldonis siajn nomojn.

Herta Kraŭs (lernanto de Guy B. Tordoff, ĉe la teknika kolegio en Bath, Brit.) sendis tre spritajn rakontojn. Dankon! Siatempo ni certe uzos ilin.

Kaj fine laŭdon al Jean Claude van den Hecke en Ker Goat, Francujo. Li sendis por ĉi tiu numero tre belan raporton pri sia ferio en Tirolo! Tian ferion ni ĉiuj ŝatus, Jean!

Sed ankaŭ Konstanz estas belega urbo kaj tie en ĉi tiu jaro okazos nia internacia junular-kunveno. Ni scivolas, kiuj el vi povos iri tien! Ĉu vi jam multe ŝparis? La kunveno certe fariĝos treege interesa!

N. K.

NIA VERKILO.

Tiel — kiel

Pli — ol




1.

La arbo estas alta la knabino.
La knabino ne estas alta la arbo.



2.

granda (instruisto; lernanto)



3.

dika



4.

granda



5.

longa



varma
malvarma


6.

El Ĉeĥoslovakujo (4-a klaso de mezlernejo en Turnov) mi ricevis treege bonajn frazojn pri: „En la lernejo”, „Sur la kampo” kaj „En la somero”.

Tutkoran dankon. Per viaj frazoj mi komprenas, ke la gelernantoj en Ĉeĥoslovakujo tiel ŝatas libertempon kiel nederlandaj gejunuloj.

P. K.

Kverelo sur la fenestro-breto.



Sur fenestro-breto staris du kakttoj kaj unu ciklamo. Unu kaktto estis dika bulo kun koleraĵaj pikiloj. La alia kaktto havis oranĝajn floketojn sur la dikaj folioj. Ĝi estis tre longa. Tial la sinjorino metis bastoneton ĉe ĝi.

La ciklamo havis malhelverdajn foliojn. Sur ĝi estis ankaŭ du blankaj floroj kaj multaj burĝonoj.

Tiam la sinjorino metis vazon sur la fenestro-breton. Ĝi estis vazo kun larĝa supra parto. Sur tiu supra parto kuŝis bruna globo. Sur la globo estis verda pinto. Sub ĝi pendis blankaj fadenoj. La fadenoj naĝis en la akvo en la vazo.

„Bonan tagon, sinjorinoj,” diris la novulino ĝentile.

Sed la kakttoj kaj la ciklamo diris nenion.

(Daŭrigota).

Esmeraldo.

Esmeraldo venas el Hispanujo. Ŝi estas hispanino. Ŝi portas belan, ruĝan, silkan ŝalon, kiu aspektas bela kun ŝia longa, nigra hararo. Ŝi havas ankaŭ nigrajn okulojn. Ŝi portas belan robon kun floroj kaj orajn ŝuojn. Ŝi havas belajn, delikatajn manojn kun longaj fingroj. Ŝi plaĉas al mi tre multe.

Ann Wilson, Tinkers Farm Lernejo, Northfield, Birmingham 31, Britujo.

La granda aventuro de du fratoj.

Colin kaj Stanley Smith, du junaj angloj, konstruis ŝipeton kaj nomis ĝin „Nova Espero”. La longo estis nur 20 futoj. Ili transiris en ĝi la Atlantikan Oceanon de Dartmouth en Kanado ĝis Dartmouth en Anglujo. La vetero estis malfavora kaj ili dum 43 tagoj vojaĝis, sed ili alvenis! En aŭgusto 1949.

Grandan surprizon ili havis. La kuraĝa ago tiris al ili la atenton de la ĵurnaloj, de la radio, de la filmteatroj kaj ili havis treege varman bonvenigon.

Sed ili ne deziras gloron. Ili deziras pli bonan mondon kaj laboras por mondopaco.

Ili intencas kolekti homojn, kiuj konsentas vivi kune kun la mo-



„Nova Espero”.

dernaj ideoj pri la rajtoj de la homo. Dum dek jaroj ili pensas pri tiu ideo kaj nun ili esperas sukcesigi ĝin. La membroj de la komunumo estos el multaj landoj, rasoj kaj koloroj. Ĉiu estos egale bona kiel alia.

La fratoj mem estos boatkonstruistoj kaj ili faris la longan vojaĝon por pruvi, ke ili ja povas konstrui boatojn kaj por reklamisian planon.

En la komunumo oni havos oficialan lingvon, kiun ĉiu povas uzi simple kaj neŭtrale. La lingvo estas Esperanto.

El tiu grupo, ili esperas, kreskos aliaj. Per tiu vivmaniero ili intencas doni helpon fortan al mondfederacio kaj mondpaco.

Ĉiuj deziras al ili sukceson.

V. C. N.

Tendaro „Verda Stelo”.

(La junularo de la Eduka Centro de Ker Goat (Francujo) lernas Esperanton. Pro tio ili faris viziton al Aŭstrujo, kie ili restadis dum ses neforgeseblaj semajnoj. La junuloj estas 12-15-jaraĝaj kaj ilia instruisto fervora Esperantisto. Unu el la partoprenintoj verkis por „La Juna Vivo” la suban verkaĵon.)

Ĝi estis bela tendumado, pri kiu mi longe memoros. Tial mi kaj ĉiuj kunlernantoj de „La Kokidejo” volas danki gesinjorojn Hilkersberger, ĉiujn esperantistajn kamaradojn, ĉiujn Kergoatajn amikojn, kies helpo ebligis nian vojaĝon.

Sabate, la 30-an de julio, je la 8-a matene, ni foriras el Kergoat. Ni estas dekse knaboj kun nia instruisto, liĝa edzino kaj la lernejestro.

La aŭtobuso atendas nin ĉe la vilaĝeto Maltournée (prononcu: Malturne), ducent metrojn de nia „Centro”. Ni estas ĉiuj gajaj, ni kantas, ni estas feliĉaj. La buso rapideĝas; la suno brilas; ĉio estas bela. Malantaŭ ni malaperas la vojoj. „Adiaŭ Dinan, adiaŭ remparoj, adiaŭ rivero Rance (pr. Rans)!”

Ni haltas ĉe Alençon (pr. Alanson) por manĝi kaj je la dua posttagmeze ek al Parizo. En la vespero montriĝas la Eiffelturo, eta kiel ludilo.

Dimanĉe, la 31-an de julio, ni trapasas nord-orientan Francujon kaj tranoktas en Colmar (pr. Kolmar).

(daŭrigota).

La venonta n-ro de „La Juna Vivo” aperos en la komenco de majo. Manuskriptoj estu en la redaktejo antaŭ la 10-a de aprilo.

KONKURSRUBRIKO.

Raportoj.

Prokrastita de la novembra (3-a grada) konkurso: multaj verketoj envenis sed bedaŭrinde nur el Anglujo. Estis tre malfacile juĝi, ĉar multaj verketoj estis tre bonaj. Mi gratulas la sendintojn de Whitburn, de Co Durham, Ann Wilson kaj Dorothy Kilgow de Tinkers Farm. — Fine ni decidis, ke kvankam ili lernis dum pli da tempo ol kelkaj el la konkursintoj, tamen Jill Farrar kaj Jean Dawson (ambaŭ de Whitburn) meritas la premion.

J. A.

1. Mi ricevis 12 provojn el 3 landoj. Sonia Marshall (Bodmin, Brit.) gajnis la premion. Ŝi faris 109 vortojn. Mi gratulas ŝin! Ankaŭ la aliajn, aparte Pamela Robilliard, Davis Chiswell (Brit.) kaj Frant. Pecka (Ĉeĥoslovakujo).

A. E. Booy.

2. Pri la „nombroj” (el la novembra n-ro): El 25 gekursantoj Valerie Baylis (Tinkers Farm) gajnis la premion pro la plej originalaj ideoj. Sekvis ŝin Robert Fraser (Kirkaldy, Skotl.), Muriel Brookes, June Childs (Tinkers Farm) Sylvia Mead, Sylvia Pickford (Canterbury Road). — Dum mi legis la provojn mi rimarkis, ke multaj ne povas skribi la nombrojn en vortojn. Ĉiu petu al sia instruist(in)o pri la sistemo, kiu estas tre simpla.

Pri la vortĉeno: Nur 20 provojn mi ricevis. El tiuj 5 estis aparte bonaj. June Prentice (Tinkers Farm) gajnis la premion per tre bona ĉeno, kiu enhavis 29 vortojn. Speciala merito de ŝia provo estas, ke ĉiuj vortoj glate kaj nature sekvas unu la alian. Bonaj estis ankaŭ la provoj de Margaret Richardson (Tinkers Farm), Valerie Savin (Rutherford High School, Derek Law (Whitburn) kaj Letty Kaplan (Hilversum, Ned.)

3. Raporto tro malfrue ricevita.

Novaj konkursoj:

I. (ĝis unu-jara lernado): Jen estas 10 vortoj. Kompletigu la sekvantajn frazojn per unu el ili:

herbo, pavo, kristalo, plumo, neĝo, sango, mielo, karbo, muso, fajro. Ekzemple: „Bela kiel floro.”

- | | | |
|---------------------|----------------------|----------------------|
| 1. Ruĝa kiel | 4. Dolĉa kiel | 7. Fiera kiel |
| 2. Klara kiel | 5. Nigra kiel | 8. Malpeza kiel ... |
| 3. Verda kiel | 6. Kvieta kiel | 9. Blanka kiel |
| | | 10. Varma kiel |

Sendu vian solvon antaŭ la 20-an de aprilo al: f-ino A. Booy, 96 Mansell Rd., Birmingham 10, Anglujo.

II. (ĝis dujara lernado): En la suba historieto oni tro ofte uzis la vorton „diris”, kiu ne karakterizas la diversajn bestojn en la rakonto. Jen estas listo de la verboj, kiujn oni povas uzi anstataŭ la vorton „diris”. Reskribu la rakonton kaj uzu la verbojn, kiuj ŝajnas al vi la plej taŭgaj:

babilis, interrompis, plendis, bojis, konsentis, ploris, demandis, miaŭis, protestis, grumblis, pepis, ripetis, sugestis, gruntis, petis, trumpetis.

La entrudema elefanto.

Kelkaj bestoj vivis kune kaj amike en vilaĝeto. Ili estis porko, kato, hundo, birdo kaj simio. Neniu kaj neniu ĝenis ilin, ĝis elefanto alvenis. Pro sia grandeco kaj malgracieco li multe ĝenis la malgrandajn bestojn. Ili proteste kunvenis por diskuti kion fari.

„Li estas danĝera najbaro”, *diris* la fidela hundo. „Ja jes, li skuas la arbojn kaj miaj idoj elfalas”, *diris* la eta birdo. „Jes, ja jes, jes, jes”, *diris* la simio. „Li tretas sur miajn piedfingrojn”, *diris* la hundo. Kaj sur miajn”, *diris* la gracia kato. „Ki:n ni faru?” *diris* la grasa porko. „Mi plendos ĉe la vilaĝestro”, *diris* la hundo. „Kaj mi, kaj mi, kaj mi”, *diris* la simio. „Li manĝas ĉion”, *diris* la porko. „Ho, miaj kompatindaj idoj!” *diris* la birdeto.

(La elefanto, la kaŭzo de la plendoj, envenas pezpede). „Mi aŭdis vin”, li *diris*. „Vi ĉiuj estas kontraŭ mi”, li *diris*. „Kion mi faru?” li *diris*.

„Iru al alia loko, inter la grandaj bestoj”, *diris* la kuraĝa hundo. „Al alia loko, al alia loko, al alia loko”, *diris* la simio. „Bona ideo”, *diris* la aliaj.

„Do, se vi insistas, mi nun foriras”, *diris* la elefanto kaj li malrapide foriris por serĉi novan lokon inter la grandaj bestoj.

Sendu vian verkaĵon antaŭ la 20-a de aprilo al s-ro Moir, 44 Francis Street, Fulwell, Sunderland, Anglujo.

III. (por ĉiuj): Priskribu rimedojn, per kiuj gejunuloj povas propagandi Esperanton.

Sendu vian verkaĵon antaŭ la 20-a de aprilo al ges-roj Anwell, 1 Belle Grove West, Spital Tongues, Newcastle-on-Tyne 2, Anglujo.

Konkursreguloj: Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

Premioj por Konkursoj: Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo: Konkurso I: „Esperanto por Infanoj” (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro” (Holmes) kantoj kun muziko. Konkurso II: „Tejo kaj Ĉerik” (Toms), historietoj, aŭ „Johano kaj Silvio” (Betts) legolibro kun angla vortaro aŭ „Neĝulino” (Grimm) aŭ libro el Konkurso I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo” (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo” (Collodi) aŭ „La Nova Testamento” aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias ke vi gajnis premion, skribu tuj al la brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.



6-a Internacia Junular-Kunveno en Konstanz, Germanujo (28/7—4/8 1950)

Adr. de la loka Organiza Komitato: Michel Schmidt, (17b)
Konstanz a. B., Grüngang 9

55 personoj el 10 diversaj landoj jam aliĝis ĝis la 4-a de marto! Nia alvoko vekis fortan eĥon kaj entuziasme multaj gejunuloj aliĝas. La Konstanza TJO-kunveno, kun siaj vizitoj al Svislando kaj Aŭstrujo, fariĝos granda sukceso!

Unua listo de partoprenontoj: **El Britujo:** 55. s-ro F. J. May (Dagenham). **El Ĉeĥoslovakujo:** 41-42. ges-roj Hlaváček (Usti n. Labem), 43. f-ino H. Proksyková (Usti n. Labem), 44. f-ino Sládková St. (Usti). **El Danujo:** 54. Povl Bo Larsen (Kvissel). **El Finnlando:** 46. J. Kiviluoto (Kojjärvi), 47. f-ino I. Vekka (Kojjärvi). **El Francujo:** 27. Roger Bizet (Wierre au Bois), 30. A. Gillet (Reims). **El Germanujo:** 19. J. L. Fischer, 20. Helmut Jödicke, 21. Michel Schmidt, 22. Gertrud Warth, 23. Martha Warth, 24. Rosmarie Meitin, 25. Alfred Zeller (ĉiuj el Konstanz), 29. Gisela Gawehns (Löderburg), 31. E. Kratzer (insulo Reichenau), 32. Hans Verner Schwarz (Konstanz), 33. Hildegund Feick (Heppenheim), 34. K. Dannecker (Wollmatingen), 35. W. F. Bierhoff, 36. s-ro Bierhoff sen. (Konstanz), 39-40. ges-roj Vilter (Konstanz), 48. Marg. v. Waldowski (Birkenw.-Berlin), 50. F. W. Poppeck (Oedsbach), 51. M. Paulun (Wuppertal), 52. Christel Müller (Wuppertal), 53. S. Kreischer (Köln). **El Hispanujo:** 28. Gregorio Esteban (Zaragoza). **El Nederlando:** 1-2. ges-roj Geurts, 3. Coby Geurts, 4. A. Kaagman, 5. C. Tuinstra, 6. J. v. Heusden, 7. L. Stapel, 8. C. Slagt (ĉiuj el Edam), 9. T. Middelbeek (Katwoude), 10. Tj. Heidbuurt (Leeuwarden), 11. W. Derks (Tilburg), 12. G. Fransen (Heerlen), 13-14. ges-roj Stoffels, 15-16. ges-roj v. Leuven (el Amsterdam), 17. M. Stöve (Dirksland), 38. N. Kool (W. Graftdijk), 49. A. C. H. v. d. Beek (Amsterdam). **El Polujo:** 45. Jerzy Grum (Jelenia Gosa). **El Svisujo:** 18. S-ro O. Walder (Romanshorn), 37. P. Le Brun (Kreuzlingen).

Unua donacisto. O. W. en Romanshorn (Svis): 5 DM; F. en Konstanz: 5 DM; M. S. en Konstanz: 5 DM; R. M. en Konstanz (Germ.): 0,50 DM; R. B. en Wierre au Bois (Franc.): 2,40 DM; A. G. en Reims (Franc.): 11,50 DM; L. B. en Kreuzlingen (Svis.): 13,20 DM; N. K. en W. Graftdijk (Ned.): 2,50 DM; M. P. en Wuppertal: 5 DM.

Ĉiu eta donaco estas bonvena! Dankon al la donacintoj.

Grupoj da gejunuloj venos ankaŭ el Britujo (el Birmingham, Seven Sisters, Denton (Manchester), Dagenham kaj Ipswich), el Francujo (Besançon, Lyon, Paris, Nancy kaj Nord Francujo), el Germanujo (Freiburg, Stuttgart, Köln, Hannover, Büsum, Borken k.a.) el Nederlando kaj el Danujo.

Aliĝu tuj! Post 1 aprilo la kostoj ja estos pli altaj. Pagu la duonan kotizon al via ĉefperanto (francoj al la konto de la 35-a U.K.) kaj sendu la plenigitan aliĝilon el la antaŭ n-ro de LJV al Konstanz!

Kostoj (inkluzive de ĉio: loĝado, manĝado kaj ekskursoj): **Aŭstrujo:** antaŭ 1-4-'50: ĝis 18-j. 120 \$., ĝis 30-j. 135 \$., pli ol 30-j. 150 \$., (ne-TJO-anoj 15 \$. pli); post 1-4-'50 la prezoj estas por ĉiu grupo 15 \$. pli altaj. Oni pagu al Alois Hilkersberger, Lötzweg 1, Landeck.

Belgujo: antaŭ 1-4-'50 la respektivaj prezoj estas: 420- 480- 540- b.fr. (ne-TJO-anoj 60 b.fr. pli), post 1-4-'50: resp. 480, 540 kaj 600 b.fr. Pagu al Ph. Cullus, Braine-le-Chateau, 36 rue du Radoux. — **Danujo:** antaŭ 1-4-'50: 56, 64 kaj 72 kr. (ne-TJO-anoj 8 kr. pli), post 1-4-'50: 64, 72, 80 kr. Pagu al Kaj Pedersen, Nord-lejren, Oxbol. — **Svedujo:** antaŭ 1-4-'50: 44, 50, 56 kr. (ne-TJO-anoj 6 kr. pli), post 1-4-'50: 50, 56 62 kr. Pagu al: Förlagsföreningen, Fack 19071, Stockholm. Ĉiam aldonu la celon de via pago! (En aliaj landoj oni petu informojn al la L.O.K. en Konstanz).

Dum la IJK ni faros moviĝantan filmon. Kaj probable ni povos montri al vi filmon **en Esperanto**, kiu daŭras 2½ horojn. Ĝi nomiĝas „La Aventuroj de Fraŭlo” (laŭ la fama desegnisto Wilhelm Busch).

En la programo okazos ankaŭ oratora konkurso. Kiel premiojn por la partoprenantoj ni jam ricevis belegajn Esperanto-librojn de s-ino Sing el Kreuzlingen. Pripensu jam nun, kion vi volas oratori pri „Esperanto kaj la Junularo”!

Ni loĝos en bone ekipita liceo, kie estas ankaŭ salonego, manĝejoj, duŝejoj, naĝbanejo, ktp. Kiu tamen preferas loĝi en hotelo devas kalkuli kun pluskosto de po 5 DM. tage.

Post via aliĝo ni sendos al vi informilon pri karavanoj, vojaĝ-vojoj al Konstanz, vojaĝprezon en Germanujo. ktp. Se vi skribas al la L.O.K. ĉiam bonvolu aldoni respondkuponon por la respondo!

Cu eblas resti iom pli longe en Germanujo post la IJK?

Jes, geamikoj, tio tre bone eblas:

1. Kiu deziras resti duan semajnon en Konstanz, povos loĝi en kristana liceo. Kostoj proksimume 4 DM. tage, inkluzive de tri manĝoj.

2. Tuj post la IJK en Konstanz okazos de la 5-a ĝis la 13-a de aŭgusto feria renkontiĝo por kristanaj gesamideanoj ĉe Murnau, ĉe la piedoj de la bavara montaro, en la proksimeco de Oberammergau, kie dum la somero okazas la pasioludoj. De Lindau al Murnau oni povas veturi aŭtobuse

(kostoj 10 DM). Dum la kunveno okazos ekskursoj, vizitoj al vidindaĵoj k.t.p. Oni povos loĝi en gastejo aŭ malmultekoste (eksterlandanoj laŭ ebleco senpage!) en grandaj tendoj ĉe la bordo de la Staffel-Lago.

Certe multaj eksterlandaj gesamideanoj kaptos ĉi tiun okazon por ĝui la spektaklon de la mondkonataj pasioludoj. Oni travivos gajajn feriotagojn en verdstela rondo! Anoncu vin baldaŭ ĉe kaplano Thalmaier, Bad Kohlgrub (Oberbayern). Germanoj sendu 1 DM por la la elspezoj de la organizado. Post 15-6-'50 ne plu estos akceptataj anoncoj.

Karavano al la 35-a UEA-Kongreso en Parizo foriros el Konstanz la 4-an de aŭgusto, je la 17-a h., kaj alvenos en Parizo la 5-an de aŭgusto matene je la 7-a horo. Vojaĝprezo Konstanco-Parizo proksimume 5 dol. (aŭ egalvaloro).

Franca karavano. Post esploro de diversaj planoj la franca ĉefperanto proponas formi karavanon al la I.J.K., kiu vojaĝos preter Bâle (Svisujo). Ĝi revojaĝos tra la Nigra Arbaro kaj Kelh. La kostoj estos proksimume 4600 fr.fr. Interesatoj tuj skribu al s-ro Roger Bizet, Wierre au Bois (P.d.C.). Eventuale oni aldonu proprajn dezirojn.

Nederlandaj partoprenontoj sin direktu al s-ro C. Geurts, Voorhaven 80, Edam, kiu gvidos la nederlandan karavanon al Konstanz.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino A. Kaagman, Voorhaven 80, Edam, Nederlando).



Belgujo: Por plifortigi sian kason la belga sekcio eldonas belgajn folklorajn pipojn, en diversaj modeloj, kun bildoj. Por 5 respondkuponoj (aŭ 30 b.fr.) oni ricevas 4 diversajn ekzemplerojn. Mendu al: R. Borremans, rue de Bériot 2A, Bruselo.

Nederlando: Ankaŭ ĉi-jare la nederlanda sekcio aranĝas unusemajnan, landan, somerkunvenon. Ĝi okazos de la 22-a ĝis la 29-a de julio en „de Stekkenkamp”, farmdomo en la apudeco de Ommen, tre bela regiono en la orienta parto de Nederlando. Ĉar la kunveno okazos tuj antaŭ la IJK en Konstanz, eble partoprenontoj en la IJK antaŭe deziras ĝui kelkajn tagojn en la nederlanda kunveno. Ĉiu estos bonvena. Oni povas peti detalajn informojn al Koos Jonker, No. 37, Oost-Graftdijk.

SKOLTA RUBRIKO.

Ĉeĥoslovakujo: Dum preskaŭ 25-jara agado de sep SEL-agentoj en Ĉ.S.R. oni sukcesis aranĝi en Ĉeĥoslovakujo du tendarojn de SEL: en la jaro 1926-a la kvinan kaj en la jaro 1934-a la dek duan. Dum la ĵamboreo en 1933 dek procentoj de la partoprenantoj el Ĉ.S.R. estis esperantistoj. Nun la ĉeĥa sekcio de Skolta Esperanto-Ligo nombras minimume 240 membrojn.

Franco: Doktoro Couteaux, prezidanto de la Franca Esperantista Unuiĝo

ĵus verkis ĉapitron pri Esperanto ĉe la skoltoj por la franclingvaj „enciklopediaj folioj de Esperantistaj Informoj”.

Al d-ro Couteau ni esprimas la dankon de ĉiuj skoltoj.

Je la 35-a universala kongreso de Esperanto en Parizo (6-13 aŭg.) ni intencas organizi skoltokskurson. Tiucele ni petas de la partoprenontaj skoltoj, ke ili skribu al Jean Guillon, 62 bis Rue Saint Blaise, Paris (20). Ili informu lin pri sia nomo, urbo, aĝo kaj skolta funkcio. Ili bonvolu aldoni, ĉu ili estas membroj de Internacia Roto starigita de Jean Texier.

Ni ĝojas ekscii ke generalo Lafont, la antaŭa ĉefa komisaro de la federacio de francaj geskoltoj, eklernis Esperanton kaj jam posedas elementan scion de nia lingvo.

Zigzaganta hipopotamo.

POSTMARKRUBRIKO.

En februaro ni ricevis 1700 kaj forsendis 1860 poŝtmarkojn.

Oskar Svantesson surprizis nin per multe da p.m. de siaj gelernantoj. Ni esperas, ke ni povu kontentigi viajn infanojn. Ni kredas ankaŭ, ke nia p.m.-rubriko al la lernejoj unularo povas montri la praktikan utilon de Esperanto. Sukceson, sveda amiko.

Francujo estis tre fervora. 800 p.m. de Claudette Boissieux, 50 de Roger Bizet, 27 el Maroko de André Secco kaj 380 de s-ro Thebaud.

Koran dankon. La respondon ni baldaŭ forsendos. Du leterojn el Anglujo. Tre afablan de nia amiko Symes. Ni dankas vin pro via letero. Ni esperas renkonti vin en Nederlando. Ĝis! Perey G. Wright sendis al ni 30 anglajn. Dankon!

Ankaŭ dika letero el Hispanujo falis en nian leterkeston. Kamarado A. Navarro sendis 110 hispanajn p.m. Ni jam respondis vian leteron, hispana amiko.

Geamikoj el la tuta mondo, sendu plu al ni viajn leterojn. Ni ĉiam klopodos serĉi la deziratajn p.m.

Libro-Servo, Edamo (Ned.).

Nepre agu tuj!!!

Ni ricevis la malĝojigan informon ke post 1 marto ne plu okazas la Esperanto-dissendoj de Radio-Parizo.

Sed — „la pordo ne estas finfermita”. Se la Esperantistaro tuj kaj grandamase ekagos la dissendoj denove regule okazos.

Do — geamikoj, skribu! Ne prokrastu! Instigu konatojn, grupojn kaj societojn, por ke ili petu la daŭrigon de la Esperanto-elsendoj de Radio Parizo! Adreso: Radio-diffusion Francais, 118 Champs Elysées, Paris 8, Francujo.

Bildprospekto en Esperanto pri la urbo Konstanz aperos en la mezo de marto. Oni senpage povas peti ĝin al: „Städt. Verkehrsamt, Konstanz a.B., Germanujo.

La Ĉeĥoslovaka Poŝto atentis Esperanton: Ĝi eldonis serion de 32 bildpoŝtkartoj, el kiuj 4 kun Esperantaj surskriboj. La kartojn povas liveri Esperanto-Asocio en Ĉ.S.R., Malá Stepánská 7, Praha II. Unu ekz., adresita al la petinto, kostas 1 respondkuponon.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belgujo: Nova Esp. grupo en aprilo aranĝos letervesperon. Ni petas bildkartojn el la tuta mondo. „Aurelo-Klubo”, Rue Wahis 186, Menin.

Britujo: Dez. kor. kun la tuta mondo 35-j. angla komencanto. Ĉefe interesas pri atletismo. Percy G. Wright, 34 Elgar Rd., Sholing, Southampton.

Ĉeĥoslovakujo: 16-j. studento Jan Kopeček, Mohelnó 321, Moravio, dez. kor. per let. aŭ poŝtk. Kolektas p.m. kaj il. kartojn. Respondo certa.

J. Matula, Jihlava, Srážná 8, dez. kor. k. gesamideanoj en la tuta mondo, interŝ. p.m. kaj poŝtk. Respondo certa.

Frant. Rozsypálek, libro-bindisto, Dyjákovice, okr. Mikulov, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

S-ro Zdenek Hlynar, studento de Jirasek-gimnazio (8-a kl) en Nachod, dez. kor. kun nederlandaj gesamideanoj pri ĉiuj temoj.

Francujo: 7 junaj oficistinoj, 15-19-j., dez. kor. kun samaĝaj koleginoj en Britujo, Nederlando, Svedujo, Italujo, Hispanujo, Danujo. Skribu unue al: F-ino Simone Mahé, 27 rue Roger-Salengro, Malaquais, Trélazé (M et L).

Estontaj instruistoj (20-22-j.) dez. kor. p. ĉ. t. precipe kun Skandinavio, k. estontaj instruistoj. Groupe Espérantiste de l' Ecole Normale, 6 Rue de la Madeleine, Besançon, Doubs.

Germanujo: 16-j. lernanto dez. kor. per il. poŝtk. kaj interŝ. tiujn kun ĉiuj landoj. Respondo certa. W. Garbade, Bremen, Nollendorferstr. 65.

Hispanujo: K-do R. Sorolla, str. Torrente vidalet, 13, 1^o = 1a, Barcelona (C) interŝ. pm. k. ĉ. l. Resp. certa, se estas per rek. letero, zorge fermita.

Irlando: 14-j. knabino dez. kor. kun samaĝulinoj en eŭropaj landoj. Patricia Harding, 64, Merville G/V, Whitehouse, Co Antrim.

Italujo: Mi dez. kor. k. fraŭlino 20-30-j. Marjo di Blasi, Via S. Pellico, 4/56, Milano.

18 knaboj, 25 knabinoj, profesoro kaj profesorino dez. kor. Skribu al prof. E. Pugno, V. Reg. Margherita II, Milano.

Nederlando: Hans Brandt (17-j.) dez. kor. k. samaĝa knabino en Francujo, Anglujo aŭ Danujo. Respondo certa. Adr.: Tesselschadestr. 49, Haarlem.

Bernard v. Moorst, 20-j. oficisto, Eendrachtspark 19, Bussum, dez. kor., prefere kun samideanoj en Eŭropo kaj Ameriko.

Eduard Rademakers, instruisto, Tivoliweg 21, Hulst (Z), dez. kor. k. ĉ. l., spec. per il. poŝtk. interŝ. poŝtm.

40 gelernantoj (17-20-j.) de la instruista seminario en Leeuwarden dez. kor. Resp. certa. Rijksskweekschool, Groot Schavernek 9, Leeuwarden.

Polujo: Stefania Ptach, 19-j. fr.-ino, dez. kor. kun gejunuloj. (Ne el Hung., Franc., Jugosl. kaj Germ.) Strebzielino, pocz Luzino, pow. morski.

„La Ponto” (gazeto de G.E.A.) publikigos en speciala n-ro en la somero de 1950 korespondanoncojn de ekstergermanaj samideanoj. Skribu al Esperanto-Centro, (13b) München-Pasing, Engelbertstr. 7, Germanujo.

SUBTENU LA INTERNACIAN JUNULAR-LABORON, MENDANTE VIAJN ESPERANTAJOJN ĈE LA TJO-LIBRO-SERVO, VOORHAVEN 80, EDAM, NEDERLANDO.